

Михаил
Лермонтов,
La anĝelo

*tradukita de Boris
Mirski*

Kun kanto solena en
nokta ĉiel'
Sin portis mirinda
anĝel';
Kaj luno, kaj steloj,
kaj nuboj en rond'
Atentis la himnon de
l' mond'.

Li kantis pri vivo sen
zorga ĉagren'
Sub branĉoj de pura
Eden';
Kaj laŭd' al keruboj,
al granda Sinjor'
Elflugis sincere el kor'.

En brakoj animon li
portis al ter',
Al mond' de malĝojo,
mizer';
Kaj restis la kanto en
juna anim'
Sen vorto, sen unu es-
prim'.

Kaj plena je stranga,
mirinda dezir'
Ĝi vagis en mond' de
sopir',
Kaj tedis al ĝi post la
kant' de l' eter'
La veaj motivoj de l'
ter'.

...

Михаил
Лермонтов,
Anĝelo

*tradukita de Vasiliĵ
Devjatnin*

En mezo de nokto, en
blua ĉielo,
Traflugis kaj kantis
plej bela anĝelo.
Kaj nuboj kaj steloj
kaj lun' en irado
Atentis kun ĝojo je l'
sankta kantado.

Li kantis feliĉajn, ne-
niam pekantajn
Spiritojn, kun Di' en
ĉielo loĝantajn;
Li kantis pri Patro
ĉiela kaj tera—
Kaj lia laŭdado ne
estis malvera.

Animon tre junan en
brakoj li tenis;
En mondo malgaja
naskiĝi ĝi venis.
Kaj sono de l' kanto
en juna animo
Restadis sen vort', sed
kun viva estimo.

Tre longe en mondo ĝi
estis premata,
Je revo mirinda pri Di'
plenigata!
Kaj ŝanĝi la kanton de
l' sankta sincero
Ne povis por ĝi ĉiuj
kantoj de l' tero.

...

Михаил Лермонтов,
Ангел

По небу полуночи
ангел летел,
И тихую песню он пел,
И месяц, и звезды, и
тучи толпой
Внимали той песне
святой.

Он пел о блаженстве
безгрешных духов
Под кущами райских
садов,
О Боге великом он
пел, и хвала
Его непритворна
была.

Он душу младую в
объятиях нес
Для мира печали и
слез;
И звук его песни в
душе молодой
Остался - без слов, но
живой.

И долго на свете
томилась она,
Желанием чудным
полна,
И звуков небес
заменить не могли
Ей скучные песни
земли.

...

Михаил
Лермонтов,
Der Engel

tradukita de N. N. 98

Argiope-informo:
La aspekto de tiu ĉi
versio estas barita.
Supozeble la aŭtoro
decidis tion.

...

*Traduko de la Rusa poemo “Ангел” de МИХАИЛ ЛЕРМОНТОВ (*1814-10-15 – †1841-07-27) en Esperanton de Boris Mirski.*

Arg-1039-2113 (2014-06-03 11:55:42)

Tiu ĉi poem-esperantigo troviĝas en <http://donh.best.vwh.net/Esperanto/iteraturo/Poezio/lermontov/angxelo.html>.

*Traduko de la Rusa poemo “Ангел” de МИХАИЛ ЛЕРМОНТОВ (*1814-10-15 – †1841-07-27) en Esperanton de VASILIJ DEVJATNIN (*1862 – †1938).*

Arg-1039-2114 (2014-06-03 12:21:00)

Pri la tradukinto vidu la vikipiedion http://eo.wikipedia.org/wiki/Vasilij_Devjatnin.

*Verkinto de tiu ĉi Rusa poemo estas МИХАИЛ ЛЕРМОНТОВ (*1814-10-15 – †1841-07-27).*

Arg-1039-2110 (2014-06-03 12:23:12)

Pri la poeto Lermontov vidu la retejon http://eo.wikipedia.org/wiki/Миджail_Lermontov.

*Traduko de la Rusa poemo “Ангел” de МИХАИЛ ЛЕРМОНТОВ (*1814-10-15 – †1841-07-27) en la Germanan de N. N. 98.*

Arg-1039-2112 (2014-06-03 17:30:50)

Tiu ĉi poem-germanigo troviĝas en la retejo <http://maschas-buch.blogspot.de/2011/09/lermontov-der-engel.html>. Vidu ankaŭ: <http://home.arcor.de/berick/illeguan/lermont1.htm>.